

UNUA RENDEVUO DIDAKTIKA

kun Claude kaj Andrée GACOND

1. Tuj malkovrigi la originalaĵojn de esperanto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 91-002-A-3, 1990.12.13

Cl.- Svisa Radio Internacia invitas vin hodiaŭ al unua rendezuo didaktika kun Claude kaj Andrée GACOND.

A.- Vi ricevadas informpetojn pri la esperanto-didaktiko, kiun vi iniciatis. Tutcerte alvenis la momento kontentigi tiujn interesatojn.

Cl.- Longtempe mi evitis raporti pri la akiritaj spertoj, ĉar mi sentis la bezonon antaŭe alveni al kelkaj metodikaj konkludoj kaj fari kelkajn kontrolojn. Sed nun ĉio sufiĉe maturiĝis, por ke mi povu alporti konsilojn al ĉiuj, kiuj deziras pli efike instrui esperanton.

A.- Kiel enkonduko, ĉu vi povus tuj difini, kio kapablas pli efikigi la esperanto-instruadon?

C.- Por plene efiki, la esperanto-instruado devas kiel eble plej rapide malkovrigi al la lernantoj la originalaĵojn de esperanto. Tiuj ĉi estas leksikaj, vortfaradaj kaj strukturŝanĝaj.

A.- Tio estas tuta programo!

Cl.- Almenaŭ mi alportas novajn instru-konceptojn. La tradicia didaktiko, ĝenerale pertraduka aŭ rektmetoda, tendencas silenti pri la esperanto-karakterizaĵoj netroveblaj almenaŭ spure en la ĉefaj etnaj lingvoj. Ĝi reduktas la instruotaĵon al tio, kio povas esti komprenebla per tradukoj al la plej konataj etnaj lingvoj. Rezulte la instruatoj restas forte ligitaj al la gepatra lingvo. Kion ili kapablas pensi nacilingve, tion ili baldaŭ regos ankaŭ en esperanto, sed la pens-strukturoj fremdaj al la propra lingvo daŭre restos al ili pli malpli misteraj. Ĉar la lernantoj ne havas la eblon lingve emancipiĝi el la gepatra pensmaniero, tial ili malfacile kapablos plene memstariĝi en la praktikado de la lingvo internacia, kies vortfaradan buntecon ili emos redukti al la nacilingva unutoneco.

A.- Vi enbrakas la lingvon en ties tuteco.

Cl.- Ekde la unua instru-horo aŭ ekde la unua enkonduka prelego mi metas la instruatojn antaŭ situaciojn, kiuj emancipigas ilin el stereotipoj propraj al lingvoj, kiujn ili konas. Ili entuziasme malkovru, ke ili povas tuj kompreni la plenan signifon de vortoj, kies ekvivalentoj eĉ ne ekzistas en la propra lingvo, ke ili povas rekte pensi en esperanto, se ili akceptas rezigni alkroĉiĝi al la nacilingvaj kliŝoj. Tiu malkovro estas ege riĉiga kaj lern-instiga. Ĝi malkovrigas novan mondon. Naĝonto vere eklernos naĝi, nur kiam li kuraĝos sin ĵeti en la akvon sen antaŭkontroli, ĉu liaj piedoj povos tuŝi la fundon kaj liaj manoj la bordon de la naĝejo. Ekzistas ja risko:

A.- Trinki "tason", kiel oni slange diras.

Cl.- Same estas kun esperanto. Parolontoj ekparolu, sen ĉiam kontroli, ĉu la parolataĵoj fakte ekzistas aŭ ne en la propra etna lingvo.

A.- Vi donu ekzemplon de paroliga situacio.

Cl.- Mi prenu kiel ekzemplon la unuan afiŝon, kiun mi montras okaze de enkonduka prelego pri esperanto aŭ dum la unua esperanto-leciono. Ĝi estas do la unua kontakto kun la vortfarado.

A.- Sur tiu afiŝo ni legas la vorton **samideano** skribita dukolore, **sam** nigre, **ide** ruĝe, **an** nigre kaj **o** ruĝe. Sub la vortelemento **sam** legiĝas la vortelemento **ali**, kaj sub la vortelemento **ide** viciĝas la vortelementoj **land**, **religi**, **urb**, **dom**, **ras**, **parti**.

Cl.- Mi legas kaj korse legigas al la publiko la vorton **samideano** kaj komprenigas ties konstruon helpe de la 4 bone videblaj vortelementoj, kies signifon ni facile malkovras. Kombinante la signifojn de **sam/ide/an** kaj **o** ni pli malpli malkovras la signifon mem de la vorto kaj la ĉeestantoj serĉas nacilingvajn ekvivalentojn, ĉiu en la propra lingvo. La franclingvanoj ekzemple proponas **coidealiste**, la germanlingvanoj **Gleichgesinner**. La ĉeestantoj kun intereso vidas, ke esperanto memstare kreas la vortojn **samlandano**, **samreligiano**, **samurbano**, **samdomano**, **samrasano**, **sampartiano**. Ili tre facile komprenas la signifon de tiuj kunmetaĵoj, sed la serĉado de ekvivalentoj en la naciaj lingvoj estas tre malfacila. La francoj havas la vortojn **compatriote** aŭ **concitoyen**, kiuj pli malpli respondas al **samlandano** aŭ **samurbano**, **coreligionnaire** ekvivalentas al **samreligiano**. Por la aliaj vortoj **samdomano**, **samrasano** ne ekzistas vorto, oni devas diri **persono el la sama raso**, **persono loĝanta en la sama domo**, ktp. Tio malkovrigas al la ĉeestantoj, ke al vorto de unu lingvo ne necese respondas vorto en alia lingvo. Ankaŭ la alilingvanoj faras la saman malkovron. Germanlingvanoj proponas **Gleichstädter** kaj **Hausgenossen** por **samurbano** kaj **samdomano**. Estas grave komprenigi, ke en esperanto tia vortlisto estas plilongigebla. Ĉeestantoj eĉ provas longigi ĝin: **samfamiliano**, **samĉambrano**, **samlitano** diras ridemulo, kaj ĉiuj tuj rideksplodas bone komprenante la koncernan signifon, sed agnoskante samtempe, ke nacilingvan ekvivalenton ili ne trovas. Tiun vortfaradan esploron ni povas daŭrigi uzante **ali** anstatataŭ **sam**: **aliideano**, **alilandano**, **alireligiano**, **aliurbano**, **alidomano**, **alirasano**, **alipartiano**, ktp. La franclingvanoj malkovras, ke ili povas diri **coréligionnaire** (samreligiano), sed ke por la nocio alireligiano ili devas diri **adepto de alia religio**.

A.- Kial vi prenis la vortelementon **ali**, dum vi povus ankaŭ diri **malsamlandano**, **malsamreligiano**.

Cl.- Pro la simpla kaŭzo, ke la uzo de la prefikso **mal** devigus min doni gramatikajn klarigojn, kiujn la vortelemento **ali** evitigas. En la instruado oni devas tre atenti pri tiaj didaktikaj detaletoj. La klarigo pri la rolo de la prefikso **mal** ne devas miksiĝi kun klarigo pri la vortfarada karakterizaĵo de esperanto, kiun bone bildigas la priskribita afiŝo. Mi ŝatas konklude klarigi, ke tiurilate esperanto funkcias kiel izoliva lingvo, kies plej konata tipo estas la ĉina lingvo. Se inter la ĉeestantoj troviĝas ĉino, kaj tio jam okazis, senpene li povas proponi ĉinajn ekvivalentojn al ĉiuj esperantaj vortoj. Ankaŭ se troviĝas anoj de aglutinaj lingvoj, ni konstatas, ke ili povas pli malpli facile trovi aŭ konstrui ekvivalentajn vortojn en la hungara, la finna, la turka, la japana kaj la svahila.

A.- Mi ĉeestis plurajn viajn demonstrojn pri esperanto, kaj mi rimarkis, ke via maniero prezenti esperanton evitigas postajn diskutojn, kiuj riproĉas, ke esperanto spirite aŭ praktike malsimilas al la latina aŭ al la angla kaj al la latinidaj lingvoj.

Cl.- Per tiu ekzemplo kaj per aliaj, kiujn ni ekzamenos en la venontaj prelegoj, mi tuj komprenigas al la ĉeestantoj, ke esperanto memstare kreas ĉiujn necesajn vortojn helpe de vortelementoj, kiujn ĝi ĉerpas el la lingvoj latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj. Per tiuj alpruntoj esperanto estas vigle ligita al la eŭropaj lingvoj, sed per la maniero kombini tiujn vortelementojn ĝi estas pli azia aŭ afrika, ol eŭropa lingvo. Jen fakto, kiu klarigas la internaciecon de esperanto ne per listo da vortoj, sed per la maniero funkcii.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Se la koncerna rendezuo didaktika kun Claude kaj Andrée GACOND vin interesis, vi povas skribi, por peti fotokopion de tiu disaŭdigo. Ni rememorigas la adreson: Svisa Radio Internacia, CH-3000 BERN 15, Svislando. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2012*